

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

La 54a Zamenhof-Festo de Kanagawa

Posttagmeze en la 15-a de decembro, en Jokohamo okazos la Zamenhof-Festo de Kanagawa, en la halo nomata "Forum Minami-Oota". Ĉi-jare estos prezento i.a. de la Tanzania UK kaj la Japana-Korea Kongreso en korea urbo. Abundas programeroj.

La Jarkunveno de NPO Esperanto Jokohama

Posttagmeze de la 2-a de februaro 2025, okazos la jarkunveno de nia rondo, en La Esperanto-Muzeo Jokohama.

Okazis

Ekspozicio pri Kuroita Katumi en Nagasaki

D-ro Kuroita Katumi (1874-1916) estas japana historiologo kaj esperantisto. Li eklernis Esperanton en 1902, fariĝis unu el la fondintoj de Japana Esperantista Asocio en 1906. Samjare li kaj aliaj kompilis Esperanto-Japanan Vortaron. Okaze de la 150-a naskiĝjaro, en la municipo Hasami, kie li naskiĝis, tiea historia muzeo okazigis specialan ekspozicion de septembro ĝis novembro. Ni pruntedonis la nomitan Vortaron al tiu ekspozicio.

3 el niaj membroj kaj vicprofesoro Kamimura Kazumi vojaĝis al la gubernio Nagasaki de la 5-a ĝis la 7-a de novembro, kaj en la 7-a ili vizitis la nomitan ekspozicion.

Pri la vojaĝo ĝenerale, legu la eseon de s-ino Cukada en p.3.

Grupa vizito el Saitama kaj Itabaŝi

Posttagmeze de la 26-a de oktobro, 7 membroj el Saitama-Esperanto-Rondo (Gubernio Saitama) kaj el Esperanto-Klubo en Itabaŝi (Metropola Gubernio Tokio) vizitis nian Esperanto-Muzeon Jokohaman, gvidite de s-ro Jabuki, saitama-ano. Ili aŭskultis de ni la funkcion de la muzeo kaj libere pasigis iom da tempo. Cetere, antaŭ nia Muzeo, ili vizitis la Ĉinan Kvartalon en Jokohamo por frandi tagmanĝon.

el X de Saitama Esperanto-Rondo



Fotoj pri nia Muzeo

Venontjare en la Esperanto-Muzeo en Svitavy, Ĉeĥoslovakio, okazos ekspozicio, lige al la samlanda 110-a UK en Brno. Por tio, ni sendis fotojn pri nia Esperanto-Muzeo Jokohama. Ni prezentas ilin. (fotitaj de Namba Fumiharu)



ekstera formo de Esperanto-Muzeo Jokohama



ĉe la enirejo pendas la bildo de d-ro Zamenhof



Ni kolektas diversajn librojn en Esperanto.



ekspozicio pri Miyazawa Kenji, fama aŭtoro kiel esperantisto en Japanio



foto de Miyazawa Kenji



Oni prezentas pri videoludo "Kotonoha Amrilato", kiu adoptis Esperanton por la lingvo en fikcia alimondo.



ekspozicio de multaj kongresaj sakoj tra la mondo



Ges-roj Doi faras multajn taskojn por plibonigi la muzeon.



Esperanto-Muzeo



eĥo el Uzbekio

Karaj E-Jokohamanoj,

Mi ĝoje informiĝis pri ĵusa apero de la 400-a numero de viakluba periodaĵo.

Vere impona kaj celebrinda jubilea evento kaj samtempe nefacila task(eg)o postulanta multan laboron, sindediĉon, fortostreĉon kaj energion.

Kiel videblas de sur la paĝoj de la bulteno, ĝi havas longan historion kaj ankaŭ kontinuan evoluon aspekte, amplekse, enhance, geografie kaj legantkvante.

Estante sufiĉe malnova leganto de "Novaĵoj Tamtamas" (NT), mi trovas ĉiun numeron plaĉa, varienhava kaj interesa. Ofte mi legas ĝin unuspire...

De tempo al tempo inter la aŭtoroj de artikoloj, mi agrable vidas la nomojn de japanaj esperantistoj, kiujn mi persone konas: iujn mi iam renkontis en Japanio dum la aliajn mi foje bonvenigis en Uzbekio.

Kore dankante kaj gratulante la redaktantojn, eldonantojn, kontribuantojn kaj subtenantojn de "NT", mi deziras al vi sukcese kaj senlace daŭrigi la tradicion plu eldoni la bultenon, kiu jam de pluraj jardekoj dissendas semojn de Esperanto-kulturo, interpopola amikeco kaj paco kaj sciigas diverslandan legantaron pri Japanio kaj pri viaj valoraj spertoj kaj atingoj en Esperantujo.

"NT" daŭre tamtamu kontruante peresperantajn pontojn de amikeco,

interkompreniĝo kaj kunlaboro inter Jokohamo kaj alilandaj urboj, inter Japanio kaj ekstera mondo!

Amikajn bondezirojn el antikva Samarkando, "Koro" de la Granda Silka Vojo, Urbo de Monda Heredaĵo de Unesko, Kultura Ĉefurbo de Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KSŜ), Monda Ĉefurbo de Kultura Turismo (UNWTO) kaj kunvenejo de la 43-a sesio de Ĝenerala Konferenco de Unesko (2025)!

Sanon al vi kaj bonŝancon,

Anatolij Ionesov

eĥo el Aŭstralio

Koran dankon pro la sendado de tiuj du bultenoj (n-roj 400 kaj 401).

Estas aparte interese por mi legi la reagojn de la legintoj de la verko de Trevor Steele "Paradizo ŝtelita", kiun mi ĝuste elektis kiel verkon originale verkitan en Esperanto de aŭstraliano por nia radioprogramo en 3zzz dum la ĵus pasinta vintro. Fakte post la sendependiĝo de Usono, la britoj bezonis trovi alian lokon kie ili povis transporti la homojn kondamnitajn al malliberejo. Ili ne ĉiuj estis aĉaj krimuloj. Kiel atestas multe da tradiciaj kantoj, ofte ili vivis en mizero kaj ŝtelis por nutri sin. La ŝtelado ofte aperos hodiaŭ bagatela. Taksado de valoro ŝanĝiĝas.

Amike, Franciska

Pri nia vojaĝo al Nagasako

Mi vojaĝis al Nagasako kun ges-roj Doi Hirokaz kaj Ĉieko kaj s-ino Kamimura Kazumi, kiu estas vicprofesoro de Universitato Ŝoosai.

Ni ekveturis en la 5a kaj revenis en la 7a de novembro.

Ĝi estis la unuafoja vojaĝo por mi al Nagasako, kaj tial mi antaŭĝojis pri tiu vojaĝo.

Ni havis multajn lokojn al kiuj ni volis iri kaj devis iri.

Do mi faris planojn kun s-ro Doi. Baldaŭ ni havis malfacilan problemon.

Estas tre oportune turismi en la centra parto de Nagasako.

Ni povas viziti *Ooura Tensudoo*, *Genbaku Doomu* kaj aliajn lokojn, kiuj estas en la urbocentro, kaj tial estas facile veturi per tramo

kaj promeni piede, sed al la alia parto de Nagasako, ni ne povis trovi transportadoilon facile.

Mi kaj s-ro Doi faris planojn kiel iri al Sotome-Regiono kaj Hasami-urbo. Tio estis malfacila kaj necesis longa tempo.

Ni konsultis multajn fojojn multfoje kaj fine ni faris perfektan planon.

Dum la vojaĝo, estis tre bona vetero.

Ankaŭ s-inoj Doi kaj Kamimura ŝajne havis ĝuon.

Ni promenis en multaj lokoj, vidis multajn, manĝis multajn kaj ridis ĉiam.

La restado al en Nagasako estis nur en 3 tagoj, sed mi ĝuis la vojaĝon pli multe.

Cukada Juuko

Respondoj de Aleksandra

S-ino Aleksandra Watanuki bonvolis respondi al la impresoj pri “La senco de *musa vivo*” aperintaj en “Novaĵoj Tamtamas” n-ro 401 kaj “La Tamtamo” n-ro 573. Koran dankon pro viaj respondoj.

★ Dankon, s-ro Sibayama!

Kun ĝojo mi legis vian altkvalitan analizon, seriozan, sed ankaŭ humorplenan! Via teorio pri daŭripoveco estas tre interesa kaj la esprimoj kiel ĉiam tre lernindaj (mi aparte ŝatas la “musiĝintan Alberton”). Bonvolu nepre verki la menciitan SF-rakonton, mi antaŭĝojas legi ĝin!

★ Dankon, s-ro Iwaya!

Mi ĝojas, ke vi opinias la rakonton ĉarma. Interese, multaj legantoj trovas similecon ĝuste al la libro de Kafka, kvankam ekzistas ne malmultaj verkoj pri subita transformiĝo. Certe vivi sendamaĝe al ĉiuj aliaj vivaĵoj ne estas facile, sed mi pensas ke indas strebi al tio.

Dankon ankaŭ pri la lingvaĵa atentigo. Mi pensas ke en nia riĉa lingvo Esperanto estas loko por ambaŭ esprimoj, kaj “daŭrigi” kaj “kontinui”.

★ Dankon, s-ino Murata!

Mi ĝojas, ke vi opinias la bildojn ĉarma! La musoj ja estas ĉarmaj kaj ja ili preferas loĝi en puraj lokoj, se ili havas tian eblecon. En mia ĝardeno loĝas familio de musoj *Kuma Nezumi*. Mi ofte observas ilin. Ili ofte lavas sin kiel katoj kaj ilia felo bele brilas. Ili foje havas idojn, sed ĉar ili ĝenerale ne longe vivas kaj aldone diversaj danĝeroj atendas ilin, la kvanto de musaro en la ĝardeno tute ne multiĝas.

★ Dankon, s-ino Miyazaki!

Mi tre ĝojas ke la rakonto plaĉis al vi! Mi ne certas, ĉu mi povos verki pli da tiaj rakontoj, sed mi dankas la proponon!

★ Dankon, s-ino Shibayama!

Mi ĝojas pro via interesiĝo pri la desegnaĵoj. La bildoj estas kreitaj uzante Artefaritan Intelekon. Plurfoje necesis ŝanĝi la priskribon por ke la bildo estu plaĉa. Ankaŭ mi uzis plurajn grafikajn apojn por plibonigi la bildojn.

Jes, en Eŭropo oni kredas, ke musoj plej ŝatas fromaĝon. Tamen laŭ mia observo de musoj, kiuj loĝas en mia ĝardeno, ili sendube preferas sunflorajn semojn, kiam ili havas elekton de diversaj manĝaĵoj.

Parenteze, se temas pri la truoj en flava fromaĝo, ili fariĝas nature kiam dum la procedo de produktado bobeloj de gaso aperas.

Mi aparte ĝojas, ke vi trovis la similecon de problemoj kun la homa imigrado. Kunvivado inter homoj kaj kun bestoj havas multajn *s i m i l a j n* malfacilaĵojn, kiujn ni bezonas trakti.

Mi deziras al ĉiuj anoj bonan ĝuon de esperanta literaturo. Mi esperas, ke “La senco de *musa vivo*” restos en via memoro kiel agrabla legaĵo.



sezonvorto decembra

Jarfina bankedo (忘年会)

Okita Kazumi

Decembro estas la sezono de jarfina bankedo, en kiu oni manĝas kaj trinkas kun amikoj kaj kolegoj por reciproki jarfinajn salutojn.

La origino de la jarfina bankedo datiĝas de la jarfina evento nomata “Kunveno de uta-amantoj por forgesi la jaron” de Kamakura-epoko (1185~1333).”

Tamen, tiu ĉi evento famiĝis inter la popolo kiel jarfina kutimo nur post la Meiji-epoko (1868~1912).

